J. Novák kaj I. Špička publikigis en Ĉeĥoslovakio, parte kun kunsultoroj, jam preskaŭ sesdek diversampleksajn verkojn pri la sindefendo, karateo aŭ la judo (artikoloj, broŝuroj, libroj). Temas pri verkoj sciencaj, fakaj aŭ lernolibroj, kiuj estas destinitaj por vastaj tavoloj de interesatoj. En 1982 la aŭtoroj kaj V. Hník eldonis en la lingvo internacia pere de ĈEA verkon, traktantan pri judoĵeto, kiu identas kun iuj variantoj de la batalago japane nomata seoi-nage. Tiun ili nomis la "transdorsoĵeto".

La unua parto de la recenzata monografio okupiĝas pri studado de fortoj kaj momentoj, kiuj efikas dum realigo de la transdorsoĵeto. La batalagon ili detale priskribas kaj klarigas la kondiĉojn, kiujn oni plenumu por efektiviĝi ĝin.

En la dua parto estas traktata taktiko por efektiviĝi la batalagon. Oni eliras el la postulato, kiu diras, ke "rezulto de batalo dependu maksimume de nia agado (kaj estu laŭeble sendependa de hazarda aŭ intenca agado fare de kontraŭulo)". Grandan atenton oni dediĉas al rolo de tempo por apliki la transdorsoĵeton kaj al la ceteraj kondiĉoj, kiuj plenumendas por sukcesa realigo de la batalago. Menciita estas ankaŭ la signifo de mensa sinpreparo. Bedaŭrinde iujn el tiuj ĉi aferoj oni traktas, pro limigita amplekso de la broŝuro, sole margene, aŭ oni nur citas respektivajn ĉeĥajn verkojn.

Sekvantaj ĉapitroj estas dediĉitaj al analizo de preparaj fazoj ĉe la atako per la transdorsoĵeto kaj al venigo de eblecoj, kiujn kontraŭulo havas por defendi sin. Kiel unu el la plej grandaj meritoj de tiu ĉi verko mi taksas priskribon, kiel elimini la efikon de firma teno per rektigitaj brakoj de kontraŭulo. La aŭtoroj tiamaniere kontribuas ĉe revivigo de la originaj ideoj de fondinto de moderna judo, majstro Jigoro Kano, kiujn tiu resumis en la principojn de maksimuma efikeco aŭ utiligo de kontraŭulo-forto por venki lin.

La ĉapitro 2.3.5.1., kie oni traktas la t.n. "kaŝitajn poŝojn" (pono: procedo por akiri reciprokan pozicion al kontraŭulo, kiu ebligas al ni apliki senpere respektivan judoĵeton) por la transdorsoĵeto, estas unu el la plej gravaj. En ĝi la aŭtoroj montras, kiamaniere oni povas per propra manovrado fari parton de la pono sen atentigi kontraŭulon pri sekvanta batalago. Tio konsiderinde pligrandigas ŝancon por ties sukcesa efektiviĝo. Plue en la broŝuro estas diskutataj eblecoj por defendi sin kontraŭ la transdorsoĵeton, kaj kondiĉoj por ligi tiun ĉi batalagon al antaŭaj judoĵetoj.

La tria parto de la verko estas destinita al ekzerc(iĝ)-ado pri la transdorsoĵeto. Eblas plene konsenti kun priskribi-

taj ekzerc-metodoj. Oni ne rekomendas lerni tuj la tutan batalagon, aŭ dispartigi ĝin en unuopajn fazojn studitajn sinsekve. Multaj lernantoj ne kapablas sufiĉe rapide aŭ entute dispartigitan batalagon poste kunmeti ĝuste. Estas priskribita nova procedo, kiu eliras el lernado de la fina parto de la batalago. Al tiu ĉi parto de la atako per la transdorsoĵeto oni poste aldonas iom post iom pluaĵn antaŭfazojn, ĝis la atakago estas kompleta. La aŭtoroj polemikas kontraŭ ofte rekomendata ekzercado de batalagoj ĝis laciĝo de praktikanto.

En la fina, kvara parto oni komparas la transdorsoĵeton kun secinago. La aŭtoroj pruvis, ke la secinago ne estas batalago, kies meĥanismo estas precize difinita, ĉar temas pri la grupo de laŭ la meĥanismo diversaj batalagoj. Oni montras, ke simila situacio estas ankaŭ okaze de iuj aliaj ĵudoĵetoj. Fine de la monografio oni klarigas, kiuj mov-eroj pliigas aŭ malpliigas efikecon de la batalago, kaj lanĉas kriterion por taksu ĝustecon de la batalagoj. La kriterio diras, ke "ĉio, kio superfluas, estas neĝusta".

Mi ne kuraĝas prijuĝi, ĉu estas oportune, ĉe kreado de la terminologio de la batalagoj, servantaj por ĵeti kontraŭulon teren (= evertoj), ne eliri el japanaj terminoj, kiuj estas hodiaŭ sufiĉe internaciaj. La aŭtoroj uzas esperantforme adaptitajn japanajn terminojn sole por la batalagoj, kiuj esprimas evert-grupon (ekz. secinago) aŭ okaze, ke oni volas atentigi pri deveno aŭ ĵudomaniera efektivigo de la batalago (ekz. de-aŝiharao). Tio estas laŭdinda, ĉar tiel estas en Esperanton enkondukitaj internaciaj vortoj ĵapandevenaj. Estas ja demando, ĉu ne estis eble fari ĉi-rilate pli.

La monografio "La transdorsoĵeto" malgraŭ sia neĝranda amplekso alportas ne sole multajn valorajn informojn, striktan ordigon de aferoj kaj novajn ideojn, sed ankaŭ utilajn praktikajn konsilojn. La publikigaĵo tre diferencas de la lernolibroj, kiuj ĝis nun traktis la ĵudon aŭ ties unuopajn batalagojn.

Bedaŭrinde, la titol-paĝo portas ne tre trafan desegnaĵon, kiu per sia rigida koncepto rememoras arĥaikajn lernolibrojn el la tempo antaŭ la dua mondmilito, kaj tial unurigerde ne vekas adekvatajn imagojn pri la enhavo.

Estus laŭdinde, se la aŭtoroj disvastigus la verkon pri la informoj nur margene menciitaj (pro manko de loko), aŭ cititaj el ĉeĥaj verkoj, kiuj estas por plimulto de la legantoj praktike neatingeblaj. Mi memkomprene scias, ke eldono de pli ampleksa tiaspeca libro ne estas sole en la manoj de la aŭtoroj, ĉi-cele oni bezonus oportunan eldoniston. Mi ja ne dubas, ke tia verko vekus fortan intereson de ĉiuj, kiuj volas penetri al la vera esenco de la ĵudo.

Ing. Arnošt Kvasnička

(estinta ĵudoinstruisto ĉe Universitato de Karolo en Praha)

# KONVERSACIO por progresintoj



Kvina temo: L E G A D O

Librojn oni legas pro amuzo, distriĝo aŭ instruo. Libroj estas binditaj aŭ brosuritaj. La binditaj libroj havas platojn kaj dorson el kartono aŭ ledo. Tie estas la titolo de libro, iam orumita. Se oni malfermas la platojn, oni trovas foliojn. Ĉiu folio havas du pagojn, kiuj estas numerataj. Sur la pagoj estas presita teksto aŭ ilustraĵoj kaj desegnaĵoj. La prao teksto estas en linioj, el kiuj estas alineoj kaj ĉapitroj. Tuj post la plato estas titolfolio, kie estas nomo de la libro, la aŭtoro kaj aliaj datoj. Poezia teksto konsistas el versoj, strofoj kaj poemoj. La verso estas ankaŭ sur unu linio, sed ili ne estas same longaj, ĉar en la verso estas grava nombro de silaboj ordigitaj laŭ certa ritmo, kelkaj vortoj, precipe al la fino de versoj, havas rimojn. Iam estas ankaŭ muziknotoj, kiuj konigas melodion kaj oni povas la poemon kanti. Tia libro estas kantaro. Krom la teksto estas sur ĉiu pago margeno, iam desegnita aŭ ilustrita. Ankaŭ komencaj literoj de ĉapitroj estas en malnovaj libroj bele ornamitaj, ili estas inicialoj.

Unuopaj pagoj de libroj estas kompostataj en presejoj el tipmulda materialo kaj presataj per maŝinoj de diversaj tipoj kaj grandecoj. Poste oni distondas aŭ distranças foliojn, ordigas kaj bindas. La tekston de libro skribis antaŭe verkisto aŭ poeto, kiu do estas aŭtoro. Iam li nur kompilis novajn tekstojn el verkoj jam antaŭaj. Muziknotojn skribis komponisto. La teksto de aŭtoro kiel ajn skribita estas por la presejo manskribo aŭ manuskripto. Libroj estas eldonataj en diverse grandaj eldonkvantoj. La eldonejo eldonas eĉ plurajn eldonojn. Iuj verkoj ekzistas en pluraj memstaraj libroj, kiuj estas volumoj. Se la kunigo de volumoj ne estas tiel granda, oni parolas pri trilogio, tetralogio, pentalogio ktp.

Laŭ la enhavo estas epiko, en kiu estas rakontata ia okazaĵo, fakta aŭ elpensita, do fantazio. En liriko oni skribas pri siaj impresoj kaj sentoj, en faka literaturo oni instruas kaj instrukcias; sed ofte la vicigo de iu libro ne estas unuŝenca. Epikaj formaĵoj estas ekzemple:

Fabelo: tute fantazia rakonto, nerealegebla, en kiu aperas supernaturaj estaĵoj, alfine venas bono. Precipe infanoj ŝatas aŭskulti ĝin. Mito estas same fantazia, sed ĝi ion klarigas kaj havas realan kernon. Mitoj estas en religioj, ĉiu nacio, tribo eĉ urbo havas siajn mitojn, ie estas tuta mitologio. En fabelo parolas kaj agas bestoj, animaloj kaj objek-

toj kiel homoj kaj alfine estas morala konkludo. Romano estas longa rakonto kun plej diversej temoj. Romanoj anstataŭis mez-epokajn kaj malnovajn eposojn kaj epopeojn, kiuj estas plej ofte en versoj. Epopeojn bardoj recitis aŭ kantis al aŭskultantoj, kiuj ne sciis legi, kaj persalajris tiel. Ili konis versojn parkere, la parkera memorado estis subtenata per versoj. Mallonga rakonto, kiu ne indas titolon romano, estas novelo, skizoj, humorajo, idilio. Satiro troigas kaj mokas tiel pri diversej malbonaj ordoj en la homara socio kaj en kontaktoj inter homoj. Balado aŭ dramo estas epikaĵo kun tragika fino. La cefa persono, bravulo, heroo aŭ protagonisto pereas.

Al lirikaĵaj formoj apartenas ekzemple odaj, kiu estas glora poemo aŭ teksto, himno, kiu estas nacia, stata aŭ asocia kanto, akrostiĥo, kiu per inicialoj de unuopaj versoj esprimas certan ideon, alegorio, kiu informas simbole, en kasita senco. Epigramo aŭ aforismo estas vortoj, kiuj koncize diras iun fakton aŭ moralan instruon. Al la faka literaturo apartenas raportajo, kritiko, recenzo, eseo kaj monografio.

Popola sageco estas en proverboj, propagando en sloganaj. Sed multajn verkojn oni ne povas facile vicigi, ĉar aŭtoro uzis sian propran manieron, bildojn, simbolojn, signojn, alian literaron aŭ ortografion. Ofte li protektis sin kontraŭ persekutado kaj cenzuro.

Homoj havas siajn libroŝrankojn aŭ bretojn por libroj. Bibliofiloj kolektas bele presitajn librojn kun posedaj etikedoj, kiuj nomigas ekslibrisoj. Librojn oni povas elprunti en publikaj bibliotekoj laŭ katalogoj aŭ ŝliparoj. Fri novaj libroj informas kritikoj kaj recenzoj. Broŝuritaĵaj libroj, broŝuroj estas malpli multtekstaj, ili taŭgas por posoj. Gazeto estas pli malpli regule eldonata teksto, kiu post tralego estas forĵetata, nur kelkajn oni kolektas por mendi poste bindadon. Jurnalaj aperas ĉiutage, revuoj estas pli luksaj kaj kun bildoj, organoj estas gazetoj de certa movado, partio aŭ socia grupo. Bultenoj, cirkuleroj kaj informiloj estas neregulaj kaj oficaj, ofte ne presitaj kiel gazetoj, sed per multobliga tekniko, fotografado, iam per nura tajpado kaj kopioj. Gazetojn redaktas redaktoro kun redakcio. Grandaj gazetoj havas plurajn redaktorojn, kiuj zorgas pri unuopaj rubrikoj kaj anguloj, en kiuj ili skribas siajn artikolojn, informojn, anoncojn, raportojn, kritikojn kaj recenzojn. Ekzistas eĉ specialaj gazetaĵaj formoj: felietono kaj daŭrigota romano. Grava parto de gazetoj estas anoncaro.

En grandaj urboj ekzistas luma gazeto, kie aperas lumaj literoj sur ortangulo. Multaj entreprenoj eldonas siajn gazetojn aŭ almenaŭ afiŝgazetojn. Al fino de jaro oni eldonas jarlibron, kiu elektas plej gravajn informojn kaj novaĵojn el la pasinta jaro, kaj almanakon, kiu elektas plej belajn tekstojn el tiu jaro. Gravajn gazetojn oni kolektas kaj lasas bindi jarkolektojn. Liveradon de gazetoj oni abonas.

Nuntempe oni povas aŭskulti novaĵojn kaj informojn en la radio, televido kaj kino. Krome ili estas akireblaj per telefono aŭ per magnetofona sonbendo. Fine oni povas aŭskulti gramofondiskojn per gramofona nadlo. Ankaŭ en tiuj kazoj oni parolas pri gazeto. En diversej kabaredaj prezentadoj estas viva gazeto.

GRAMATIKO: 1. Elektu kvin frazojn el tiu temo kaj aldonu al ili: por ke /por + infinitivo. Ekzemplo: la broŝuroj estas malpli multekostaj; vi aldiras: ...por ke ĉiu povu aĉeti ilin. 2. Trovu kvin frazojn kun pasivaj participoj kaj esprimu ilin alimaniere, sen pasiva formo.

STILO: 1. Prenu formaton de papero 297 mm x 210 mm, faldu ĝin kaj skribu /desegnu/ kvarpaĝan gazeton, kies redaktisto vi estas kaj kiun vi redaktas tute mem. 2. Skribu interesan miton el via urbo au lando por via eksterlanda amiko. 3. Skribu, kiujn Esperantajn librojn vi legis. Nomu ilin kaj diru, kion vi legas en Esperanto.

DEMANDOJ: 1. Nomu organojn de diversaj Esperantaj movadoj. 2. Kiu Esperanta libro havas plurajn volumojn kaj kiom? 3. Kiujn Esperantajn kantojn vi konas? Kiujn vi mem kantas? 4. Kie estas publikaj bibliotekoj? Kiaj kotizoj estas pagataj por pruntado de libroj? 5. Nomu Esperantajn verkistojn. 6. Kiu Esperanta revuo dediĉas sian atenton al faka literaturo?



# heraldiko

# veksilologio

## La ĉeĥoslovaka ŝtata blazono

La 28-an de oktobro 1918 estis kreita Ĉeĥoslovaka respubliko. Ĝi havis tri blazonojn: malgrandan, mezan kaj grandan. Laŭ la leĝo n-ro 252 de la 30-a de marto 1920 ili aspektis jene:


(§ 4) La malgranda blazono de Ĉeĥoslovaka respubliko estas: Sur ruĝa ŝildo argenta duvosta leono en salt-poza dekstren rigardanta, buŝon malfermitan, kun lango elŝovita, ungegoj kaj diademo, ĉio de ora koloro, portanta sur sia brusto rujan ŝildeton kun tri bluj montetoj, el kiuj sur la meza pli alta estas levita argenta patriarka kruco.

(§ 5) La meza blazono de Ĉeĥoslovaka respubliko havas du ŝildojn, antaŭan kaj malantaŭan.

Sur la antaŭa (korsildo) estas la ĉeĥa blazono: sur ruĝa ŝildo argenta duvosta leono en salt-poza dekstren rigardanta, buŝon malfermitan, kun lango elŝovita, ungegoj kaj diademo, ĉio de ora koloro.

La malantaŭa ŝildo estas kvaronigita. En ĝia supra dekstra kampo estas la slovak blazono: sur ruĝa ŝildo tri bluj montetoj, el kiuj sur la meza pli alta estas levita argenta patriarka kruco. En la maldekstra supra kampo estas la blazono de Subkarpatia Rusio: ŝildo vertikale fendita; en la dekstra,





blua kampo tri oraj traboj, en la maldekstra, argenta kampo staranta ruĝa urso dekstren rigardanta. En la dekstra malsupra kampo estas la moravia blazono; sur blua ŝildo dekstren rigardanta aglo kun diademo, argente kaj ruĝe sakumita. En la maldekstra malsupra kampo estas la silezia blazono; sur ora ŝildo dekstren rigardanta nigra aglo kun diademo, kun ruĝa armaĵo, kun argenta brustluno ĉefine kun trifoli-formaj folietoj kaj meze ornamita per kruceto.

(§ 6) La granda blazono de Ĉeĥoslovaka respubliko konsistas el ŝildoj antaŭa kaj malantaŭa.

Sur la antaŭa ŝildo estas la ĉeĥa blazono: sur ruĝa ŝildo argenta duvosta leono en salt-pozo dekstren rigardanta, buŝon malfermitan, kun longo elŝovita, ungegoj kaj diademo, ĉio de ora koloro.

La malantaŭa ŝildo estas dividita je sep kampoj per tri horizontalaj strioj tiel, ke la supraj du estas fenditaj duone, la tria suba fendita tri-ono. En la supra dekstra kampo estas la slovak blazono: sur ruĝa ŝildo tri blujaj montetoj, el kiuj sur la meza pli alta estas levita argenta patriarka kruco. En la maldekstra supra kampo estas la blazono de Subkarpata Rusio: ŝildo vertikale fendita; en la dekstra, blua kampo tri oraj traboj, en la maldekstra, argenta kampo staranta ruĝa urso dekstren rigardanta. En la dekstra meza kampo estas la moravia blazono: sur blua ŝildo dekstren rigardanta aglo kun diademo, argente kaj ruĝe sakumita. En la maldekstra meza kampo estas la silezia blazono: sur ora ŝildo dekstren rigardanta nigra aglo kun diademo, kun ruĝa armaĵo, kun argenta brustluno ĉefine kun trifoli-formaj folietoj kaj meze ornamita per kruceto. En la dekstra suba kampo la blazono de Tesin-regiono: sur blua ŝildo ora aglo dekstren rigardanta. En la suba meza kampo la blazono de Opava-regiono: ŝildo ruĝe kaj blanke fendita. En la maldekstra suba kampo la blazono de Ratibor-regiono: ŝildo fendita; en la dekstra blua kampo ora aglo kun diademo dekstren rigardanta, la maldekstra kampo blanke kaj ruĝe fendita.

Sur la dekstra kaj maldekstra flankoj de la ŝildo staras ora leono duvosta kun diademo kiel la ŝildogardanto. Sub la ŝildo volvigas rubando, sur kiu estas legebla devizo: "La vero venkas!"

Laŭ § 7 la registaro estis rajtigita difini kiam kiun blazonon oni devas uzi.

En la jaro 1960 estis akceptita nova, socialisma konstitucio, laŭ kiu Ĉeĥoslovakio estis proklamita socialisma respubliko. En la Konstitucio (de la 11-a de julio 1960) en artikolo 110 estas priskribita la nova blazono de la socialisma Ĉeĥoslovakio jens:

"La statan blazonon de Ĉeĥoslovaka socialisma respubliko formas ruĝa ŝildo en formo de la husana popola ŝildo kun kvinpinta stelo en la supra parto, sur la ŝildo estas blanka duvosta leono portanta sur la brusto ruĝan ŝildeton kun blua silueto de Kurbmonto kaj bivakfajro de ora koloro. La desegno de la blazono estas ora."

La saman priskribon de la ŝtata blazono enhavas ankaŭ la leĝo n-ro 163 de la 17-a de novembro 1960, kiu samtempe nuligas la leĝon n-ro 252 de la 30-a de marto 1920 kaj la ekziston de tri blazonoj. (La blazonon de la socialisma Ĉeĥoslovakio vidu en Starto n-ro 4/1986, pg. 12.) J. Patera

### Pensoj antaŭ Centjarigo

- Ankaŭ la esperantistoj nur tion povas fari, kio venis al ili en la menson.
- Nia granda mistifikado estas la Universala Kongreso. La mondo - registaro, loĝantaro, gazetaro ktp. - vidas, kiom agemaj estas la esperantistoj: konferencoj, kunvenoj, rezolucioj, planoj, proponoj, diskutoj, teatraĵoj ktp. - Sed.... kie ili malaperas poste?
- Ĝam unu neologismo aŭ gramatika bagatelo kapablas dividi esperantistojn kaj maski senfinejn diskuton, disputon, eĉ bedaŭrinde reciproke kalumniadon.
- Esperantujo certe apartenas al la Tria Mondo; ĝi bezonas helpon.
- En Esperantujo oni ofte vive enterigas personojn. Ho, ne en tombon, sed en la forgeson.
- La plej grava problemo por Esperanto, por la movado, eĉ por la estonteco: KIE ellerni bonege Esperanton? La "elito" povas esti ekzemplo, sed ne solvo!
- La esperantistoj neniam estas kontentaj pri la evoluo de Esperanto. Tial oni povas legi tiom da ĉefartikoloj pri la farendaĵoj.
- Ofte la esperantistoj mem estas la unuaj kaj la plej fervoraj disvastigantoj de niatempe aperantaj artefaritaj lingvoprojektoj, en la Esperanto-gazetaro. Nome, la neesperantista gazetaro absolute ne okupigas pri ili.
- La konferencoj, simpozioj konstatas la tiaman situacion de Esperanto kaj movado, ĝenerale tion, kion ĉiu scias kaj konas. Pro tio neniam ŝanĝigas io.
- En la pri- kaj poresperanta informado /propagando/ pli gravas la gepatra lingvo kaj la fakscio ol la scio de Esperanto.
- Legante la kritikojn pri vortaroj, gramatikoj, libroj, oni vole-nevole venas al la konkludo, ke en Esperanto naskiĝas lingve kaj en have plej ofte nur fuŝverkoj, precipe la tradukoj. /Akademiano nomis la romanon de konata verkisto - Ĉu....? libroj -, verkaco en sia eseo-recenzo./
- Demando: Ĉu la unua jarcento estis malfacila aŭ la dua jarcento estos eĉ pli malfacila? D-ro István Nagy

# Rondeta vivo



Nunjara IX-a I T R E E - Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro - okazis de la 5-a ĝis la 10-a de oktobro en Germana parto de Ercmontaro kaj kompreneble sukcesis.

Feria Domo de la Paperfabriko "Franz Dziebko", lokita en belega ĉirkaŭaĵo de ercmontara urbo Schwarzenberg - en ANTONS-  
HOHE, gastigis 60 lingvoamikojn el kvin landoj. Partoprenantoj venis ne nur el Germana Demokratia Respubliko kaj el Ĉeĥoslovakio, sed ili venis ankaŭ el Bulgario, Pollando kaj el Hungario.

Ciuj, piedmarsiante tra montaraj arbarvojoj, guis belan aŭtunan veteron kaj rigardis buntajn deklivojn de la regiono. La internaciaj gastoj vizitis multajn vidindaĵojn, ekzemple la fervojistan muzeon en Rittersgrün, kastelon Schwarzenberg, laboristan hejmon en Bermsgrün, teknikan monumenton "Argenta purigejo" k.a.

Dum solena inaŭguro partoprenantoj gratulis al organizantoj de la jam tradiciaj Ercmontaraj Renkontiĝoj - al membroj de Esperanto-rondo en subdistrikto Schwarzenberg al 20-jara jubileo.

Kulmina punkto de la renkontiĝo estis rememora vespero, dediĉita al la festotago de GDR - 37-jara jubileo de GDR.

El ĉiuj vortoj diritaj dum salutvortoj, paroladoj kaj diskutoj oni aŭdis deziron vivi en paco kaj kunlabori pri la pacdefendado. La renkontiĝo donis plurajn impulsojn por la amikeco de la popoloj.

Venontjare en la kadro de internacia kunlaboro oni aranĝos la Ercmontaran renkontiĝon denove en la ĉeĥa flanko de Ercmontaro.

Alena Klementová

Estas bela tradicio interŝanĝi salutleterojn okaze de la MONATO de ĈEĤOSLOVAKA-SOVIETIA AMIKECO inter esperantistoj de LOKA GRUPO de ĈEA en KARLOVY VARY kaj esperantistoj en S O -  
V E T U N I O.

Karlovvaraj esperantistoj dissendis nunjare pli ol 25 salutleterojn, en kiuj gratulis al 69-a jubileo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. Krome ili frate salutis ĉiujn sovetiajn esperantistojn kaj petis reeĥon por la letervespero, kiu estis planita la 10-an de novembro 1986 - honore al la Internacia Jaro de Paco.

Por la salutvortoj karlovaranoj uzis la leterpaperon kun desegnaĵo de Pavel Rak, sur kiu suprenfluganta kolombo esprimas liberecon, feliĉan vivon kaj PACON.

Karlovaranoj volus per tiuj ĉi jam tradiciaj letervespe-

peroj esprimi la nerompeblan fratan amikecon inter la popoloj de USSR kaj Ĉeĥoslovakio. Tial flugis la salutleteroj al la diversaj anguloj de Sovetunio - al tre malproksimaj kaj al ne tro malproksimaj kiel ekzemple al Taŝkent, Novosibirsk, Duŝanbe, Krasnojarsk, Vladivostok, Soĉi, Samarkand, Tallinn, Urgenĉ, Leningrad, Smolensk, Tihvin, Krasnodar, Niĵnevartovsk, kompreneble al la ĉefurbo Moskva kaj al aliaj lokoj.

Tie ĉi havas karlovaranoj jam multajn sincerajn leteramikojn.  
Alena Klementová

## ESPERANTO - INTERKOMPRENILO ANKAŬ POR FAKULOJ

En septembro de ĉi tiu jaro okazis, en la kadro de interkonsento inter Scienc-teĥnika societo de n. e. Geindustria Praha (geologia esploro) kaj Hungara geologia instituto (MAFI), faka ekskurso de ĉeĥoslovakaj geologoj en Hungarion. Organizanto de la ekskurso el la hungara flanko estis konata esperantisto vjadirektoro de MAFI, profesoro d-ro Endre Dudich, C. Sc., el ĉeĥa flanko aŭtoro de ĉi tiu artikolo. La interkomprenilo dum la preparo, sed ankaŭ dum la paso de la ekskurso estis Esperanto.

La unuan tagon de semajna restado en Hungario ni vizitis Budapeŝton. D-ro Dudich bonvenigis nin en Hungara geologia instituto, montris al ni ampleksan geologian kolektaĵon kaj informis pri la agado de la instituto. Poste sekvis la rigardado de Budapeŝto kun faka klarigo pri geologia strukturo de la urbo kaj pri ĝiaj termalaj fontoj.

En pluaĵ tagoj ni vizitis vicon de krudaĵ-trovejoj en la montaro Bakonya Arbaro (nordokcidente de Balatono), ekzemple trovejojn de sabloj por vitrofarado kaj metalurgio, de pirofilito, bauksito, netradicia krudaĵo - alginito, kiun oni komencas uzi en Hungario ĉefe en agrikulturo.

Ĉe la urbo Szekesfehervár, kiu estis dum 500 jaroj kronadloko de hungaraj reĝoj, ni vizitis antikvan romian militkampadejon kaj urbon Gorsium kun multnombraj restaĵoj de romiaj konstruaĵoj.

Miaj gekolegoj estis neesperantistoj kaj pro tio mi tradukis la fakon klarigon de d-ro Dudich el Esperanto en ĉeĥan lingvon. Dum ĉi tiu ekskurso oni atestis, ke Esperanto estas lingvo riĉa kaj bone uzebla ankaŭ por fakuloj. La ekskurso ebligis al niaj geologoj komparadon de niaj krudaĵ-trovejoj kun similaj hungaraj. Nia internacia kunlaboro estis sukcesa. Ĝi prezentis ankaŭ bonan propagandon de Esperanto inter neesperantaj fakuloj.

RNDr. Aleš Nedomlel, Liberec

KARAJ GEAMIKOJ!

OKAZE DE LA GRANDA OKTOBRA REVOLUCIO BONVOLU AKCEPTI DE NI  
TUTKORAJN GRATULOJN KAJ BONDEZIROJN POR SUKCESA E-AGADO  
KAJ PAĈLABORO!

ESPERANTO-KLUBO PACIFIKANOJ, VLADIVOSTOK USSR

## Tendaro por Esperanto-pioniroj

De la 23a ĝis 28a de februaro 1986 okazis renkontigo de esperantistaj junaj pioniroj en la Centra Pionira Tendaro "Palmiro Togliatti" en Einsidel ĉe Karl-Marx-Stadt /GDR/.

La aranĝon organizis la distrikta junulara komisiono de GDREA en Karl-Marx-Stadt kun afabla subteno de la distrikta estraro de la Libera Germana Junularo.

Nia Esperanto-grupo ricevis invitilon de niaj germanaj korespondantoj el vilago Marbach, gelernantoj de baza lernejo kaj partoprenis. Krom ni - 14 knabinoj el urbo Trutnov - ceestis ankaŭ lerneĵanoj el diversaj distriktoj de GDR kaj 12 pioniroj el pola urbo Koszalin.

La programo estis interesa, riĉa. Ĝi enkluzivis ekskursojn al urbo Aue kaj Karl-Marx-Stadt, dumnoktan migradon, karnevalan vesperon kaj programon kun la magiisto el Karl-Marx-Stadt. Ĉiutage estis Esperanto-kurso, okazis kantetoj, dancoj, diversaj ludoj.

Poste nia grupo vizitis niajn geamikojn el vilago Marbach, kie atendis nin pluaj interesaj tagoj. Al ni tre plaĉis ĉe niaj germanaj kamaradoj kaj kamaradinoj. Nunjare ili alveturos reciproke al ni.

Vlasta Janáková, prezidentino de E-grupo Trutnov.



Praha. Dum la tagoj 17 - 19. 10. 1986 efektiviĝis la unua renkontigo de la membroj de EK Praha kaj EK Baumschulenweg en Berlin. Ekregis tuja, neformala amikeco inter anoj de ambaŭ ĝemelkluboĵ. Esperanto nuligis ĉiujn landajn, lingvajn kaj tiujn de aĝoj diferencojn kaj ni kvazaŭ mirakle unuavide ekscitis unuj la aliajn. Dank' al la afabla oferemo de niaj gastigantoj, ni multon vidis, eksciis kaj audis. Berlin estas grandioza, moderna videnda urbeĝo. Modele funkciis la nove ligita interkluba amikeco kaj ni senpacience atendas la reciprokan viziton al ni en Praha.

H. Ŝ.

**Brno.** Sian 85-jariĝon rememoris Esperantista Klubo en Brno per granda solena koncerto la 14.10.1986. Kantis niaj amataj artistoj, merita artisto Václav Halíř, prof. Helena Supová-Halířová, operkantisto J. Škrobánek k.a. Estis prezentitaj en nesuperebla maniero la plej belaj arioj el la ĉeĥaj operoj, ŝeĥe kaj Esperante. La artistoj rikoltis neĝesantan aplaudon. La ĉeestantojn bonvenigis prezidanto de la klubo Z. Hršel, la historion de la klubo kaj ĝian aktivecon koncize prezentis J. Vondroušek. La granda salono estis plenplena. Aperis pluraj ampleksaj gazetartikoloj.

Kurso por komencantoj estis inaŭgurita la 7.10.1986. Partoprenas 15 personoj. Kurso por progresintoj dauras. Ambau kursojn gvidas J. Vondroušek. (J.Vondroušek)

**Náchod.** Dum amika renkontiĝo okaze de Tago de Laborantoj en Kulturo kaj Korpedukado en la urba teatro en Náchod la 29-an de oktobro 1986 la konsilantaro de la Urba Nacia Komitato en Náchod atribuis honor-diplomon al la prezidanto de Esperanto-klubo en Náchod Karel Strouha por la oferema kaj merita aktiveco sur la kampo de kultur-eduka laboro. (K.S.)

**Olomouc.** La 14-an de marto 1986 festis Esperanto-klubo en Olomouc sian 75-an datrevenon. Kadre de tiu ĉi grava jubileo ni rememoru iom da historio.

Unuan Esperanto-kurson gvidis jam en la jaro 1909 prof. Eugen Fierlinger, la patro de la bone konata politikisto Zdeněk Fierlinger. Nombro de la interesuloj rapide kreskis, do la 14-an de marto 1911 estis fondita Esperanto-klubo, kiu sukcese komencis ĉiaspecan laboron. Aktiva kaj la plej laborema estis precipe la grupo de studentoj, kiun ni konas sub la pseudonimo "Moraviaj Esperanto-Pioniroj". Tiu ĉi grupo aktive laboris nome post la 1-a mondmilito, kiam ĝi eldonis entute 16 titolojn de libroj, el kiuj la plej konata estas "La blanka malsano" de Karel Capek, aperigita dum la nazia minaco de nia patrolando.

En la jaro 1932 en Olomouc estis organizita la V-a nacia Esperanto-kongreso, kadre de kiu estis lokita en Smetana-parco Esperanto-memorŝtono, apude plantita Esperanto-arbo kaj la najbara strato nomita laŭ D-ro L.J. Zamenhof.

La sukcesa agado de la olomoucaj esperantistoj estis ĝesita fare de faŝismo kaj tuta vico da klubanoj estis arestata pro siaj kontraŭfaŝismaj opinioj, du mortis en koncentrejo Oswięcim.

Post la liberigo de nia patrolando la olomoucaj esperantistoj renovigis sian agadon, aranĝis multajn prelegojn, kulturvesperojn kaj koncertojn por publiko. Iliaj laborbrigadoj helpis konstrui tramvojojn, observatorion kaj zoogardenon, ili eldonis kelke da informfolioj pri Olomouc en Esperanto.

Nuntempe grupiĝas la olomoucaj esperantistoj kadre de Parko de Kulturo kaj Ripozo en Olomouc, la ĉefa kluba agado estas instruado de Esperanto, prelegoj de la klubanoj pri ilia eksterlanda vojaĝado kaj vizitoj de eksterlandaj gesamideanoj en Olomouc.

(Jan Pavlík)

Esperantský klub MS ČES v Třebíči Vás srdečně zve na

L e t n í e s p e r a n t s k ý t á b o r

v nádherném prostředí Vranovské přehrady na jižní Moravě.

Tábor se koná v těchto termínech:

první etapa 28.6. - 11.7.1987

druhá etapa 12.7. - 25.7.1987

třetí etapa 26.7. - 8.8.1987

Mimo kulturně rekreační program je každý účastník povinen navštěvovat některý z kursů esperanta.

Podrobné informace a přihlášky zasílejte na adresu:

Klub esperantistů  
místní skupina ČES  
674 01 TŘEBÍČ

### Radio Praha parolis pri Esperanto

La 2-an de oktobro 1986 je la 8-a matene oni elsendis duonhoran intervjuon kun Jiří Kořínek kaj doc. D-ro Vl. Novobilský, CSc., sub titolo "Ambasadoroj de nia kulturo rakontas pri sia granda amo".

La 16-an de oktobro docento Novobilský parolis pri Esperanto kiel pontlingvo ĉe maŝina tradukado (pri la nederlanda projekto).

La 12-an de novembro 1986 oni parolis pri 80 jaroj de Esperanto en la orientbohemia urbo Náchod.

La 19-an de novembro en la programo "Bloko da vortoj kaj muziko" pri renkontigo de sekcio de invalidoj en Hrabyně apud Opava.

La 21-an de novembro oni menciis pri la centjara jubileo de Esperanto en 1987. (Laŭ J.M.)

### Filatelio

Pluan orumitan medalon por sia medal-kolekto akiris nia membro Dolfa Bartošík per sia eksponaĵo pri la temo "Esperanto en filatelo", en ekspozicio okazinta en oktobro kaj novembro en Vodňany. Bartošík partoprenis ĝin laŭ rekomendo de la Ĉeĥa filatelista asocio. (J.M.)

### Ludantoj de ok nacioj

En futbala teamo de svisa ligo AS Bellinzona estas ludantoj de ok nacioj kaj interkomprenigo estas por trejnanto (li parolas france) tre malfacila. Klubestro Lazzarotto diras, ke franca lingvo estas ekzemple por dano Croiss, germano Fagot aŭ aŭstra trio Schaeer, Hafner kaj Schöenberger nekomprenebla kaj plue aliaj ludantoj parolas la tessink-dialekton kaj tial li volas ordoni devigan lernadon de Esperanto. (Laŭ "Stadion" n-ro 43/1986 - J.O.)

### Brazila Esperanto-Ligo - BEL

Ni eksciis, ke okazis signifaj ŝanĝoj en la Brazila Esperanto-Movado, nome kunfandiĝis la du naciaj organizaĵoj (Brazila Esperanto-Ligo - BEL kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto - BKE) kaj el tio rezultis unu sola organizaĵo, kies nomo restis Brazila Esperanto-Ligo - BEL. BEL kaj ĝia tuta grava biblioteko translokigis al la brazila ĉefurbo Brasilia, al propra sidejo, kiu antaŭe apartenis al BKE. En junio 1986 la brazila e-istaro elektis novan estraron.



# KORESPOND DEZIROJ ANONCOJ

28-jara polo, laboristo, edziginta, volas korespondi kun geamikoj el Ĉeĥoslovakio. Li interesigas pri multaj aferoj, ekz. pri fremdaj landoj, Esperanto, muziko, sporto, vojaĝoj. Li kolektas bildkartojn. Lia adreso: Bogusław Urbaniak, ul. Kościuszki 7, 42-620 Nakło SL, Pollando

36-jaraj polaj geedzoj el malgranda loko proksime al urbo Gdańsk deziras korespondi kaj konatiĝi kun ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Iliaj interesigoj estas: turismo, diversaj turistikajtoj, kolektado de postmarkoj kaj bildkartoj, esperantaĵoj kaj esperant-agado. Adreso: Halina kaj Zbigniew Zawistowsky, ul. Dworcowa 21o/7, 83-130 Pelplin, Pollando

23-jara polino interesigas pri fotoarto kaj pentroarto. Jolanta Babiarz ul. Kościuszki 5/2, PL-57-200 Ząbkowice Śl., Pollando

Du hispanaj studentoj, kiuj eklernis Esperanton, volas korespondi kun junulinoj 18-30-jaraj el nia lando. Joan Enric Alberola Sendra C/ Dr. Fleming N<sup>o</sup> 1 Benifairo de Valldigna 46791 Valencio, Hispanio (liaj hobiaj: ĉiuj temoj, precipe fotografio kaj astronomio) Juan Jesus Torres Sosa C/ Lorca N<sup>o</sup> 3; 5<sup>a</sup> pta 9 46018 Valencio, Hispanio (liaj hobiaj: ĉiuj temoj)

20-jara marokano deziras korespondi france aŭ angle kun junulinoj 15-18-jaraj. Li satas sporton kaj muzikon. Adreso: Abdellatif DARDAK, BP: 5528 Takadum, CASABLANCA 05, Maroko

Korespondi deziras en franca lingvo pri E-Movado en ĈSSR a-ro EL MOUKH SAID, DB: ATTAOUNE, Rue 74 - No 19, Cité Hassani, CASABLANCA 02, Maroko



33-jara diplomita flegisto volas korespondi kun esperantistino el Ĉeĥoslovakio. Liaj interesoj: medicino, precipe psikiatrio kaj neurologio. Li satas danci, promeni en la naturo kaj ĝui la silenton en la naturo, vojaĝi per aŭtomobilo, iri al kinejoj, legi interesajn librojn, naĝi, li satas la sunon. Lia adreso: Eugen KUTZ, Fachklinik "Fürstenhof" 3590 Bad Wildungen, B.R.D.

Kun ĉeĥoslovakio deziras korespondi en franca lingvo kaj Esperanto (li estas komencanto) pri sindikata movado kaj Esperanto: AZIZ TEKKI, Bloc 8 No 355, Cité Municipale, Cité Hassani, CASABLANCA /02/, Maroko.

Esperantistoj, kiuj havas intereson pri handikapuloj kaj handikapuloj, mem povas kunlabori kun gazeto Voĉo de Handikapuloj. Oni pritraktu jenajn temojn el pluraj vidpunktoj:

1. Diferenco inter denaska kaj poste trafita handikapiteco
2. Handikapita korpo kaj kreaj potencoj
3. Handikapulo - sana homo
4. Socio, medicino, ekonomio kaj handikapitaj homoj
5. Esperanto-handikapuloj



Viaj kontribuoj pri la prezentitaj temoj devas esti de du ĝis maksimume tri pagoj, tajpitaĵoj kun interspaco kaj margeno, en bona lingvo. La materialon bv. sendi al adreso: Voĉo de Handikapuloj, red. Dušan Adnadj, Ŝkolaska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

Nota. La jarabono inkluzive membrokotizon estas 5 US dolaroj aŭ egalvaloro. Pagojn bv. direkti al supra adreso.

IAHE - Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj estas eĉo de la bezonoj de invalidaj esperantistoj, kie ili kun siaj fortoj kaj kapabloj aktive partoprenas en la solvado de siaj pluroblaj problemoj kaj problemoj de la monda komunikado pere de Internacia Lingvo - Esperanto. Aligilojn sendas kaj helpon akceptas Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, Ŝkolaska ul. 25, YU-56227 Borovo, Jugoslavio.

Al ĉiuj gesamideanoj, kiuj kondolencis okaze de la morto de mia edzo

JAROSLAV KLEMENT,

sincere dankas Alena Klementová.

Samtempe mi petas ĉiujn, al kiuj mi ne sendis persone funebraĵon anoncon, senkulpiĝu min, ĉar mankis fortoj tion ĝustatempe fari. Mi ankaŭ ne trovis adresojn de tiuj, kies adresojn Jaroslav konis parkere.

Alena Klementová.

Loka grupo de ĈEA Esperanto-Asocio en Karlovy Vary anoncas, ke la 19-an de oktobro neatendite mortis, dum restado en banejkurbo Běloves,

s-ano ANNA TATĤLOVÁ el Karlovy Vary.

Ŝi estis membrino de fervojista sekcio, longan tempon ŝi laboris en komitato de nia Loka Grupo kaj ankaŭ dum kelkaj jaroj ŝi gvidis la grupon kiel prezidantino. Ŝi apartenis al ardaĵ pacbatalantoj kaj laboris en Distrikta Packomitato en Karlovy Vary, ankaŭ en Kontraŭfasisma movado.

Ŝi senlace partoprenis multajn esperantistajn arangojn kaj renkontiĝojn, volonte ŝi vizitadis SET en Lanĉov, renkontiĝojn en Jablonec, Pardubice kaj aliajn. Rememoru por ĉiam, ke ŝi sciis esti kara, ĝoja kaj afabla.

Alena Klementová

Loka grupo de ĈEA en Náchod anoncas, ke la 28-an de oktobro mortis

s-ano JAROSLAV NOVÁK.

Li estis longjara membro de la Esperanto-klubo en Náchod, al Esperanto li tre aktive dediĉis sin ekde la jaro 1953. Dum lastaj jaroj li estis prezidanto de la Esperanto-rondeto ĉe ZK ROH n.p. Mez en Náchod. Li forlasis nin en ago de 53 jaroj.

Karel Strouha

Kun malĝojo ni anoncas, ke la 19-an de novembro 1986 forpasis 87-jara dumviva merita membro de ĈEA, en pasinteco longjara prezidanto de nia LG en Prostějov

s-ano STANISLAV JEŘÁBEK.

Ĉiam sindona kaj entuziasma amiko, instruanto kaj konsilanto li preskaŭ ĝis lastaj tagoj fordonadis al ni siajn ricajn vivspertojn. Ni ŝatis nin amike reciproke. Honoron al lia memoro.

(BT)

---

# el la sekretariejo

---

## Pisemný kurs pro pokročilé

Několik let se velmi úspěšně vyučuje esperanto pomocí písemného kursu. Protože se zjistilo, že základním písemným kursem končí veškerá výuka, bylo rozhodnuto zavést také písemný kurs esperanta pro pokročilé. Tento kurs není určen jen těm, kdo v této době ukončili základní písemný kurs, ale je určen všem zájemcům o další vzdělávání v esperantu. Informace a přihlášky zasílejte na naši adresu: Český esperantský svaz, Jilská 10, 110 01 Praha 1. Kursovné pro členy ČES všech kategorií 160,- Kčs, pro nečleny ČES 210,- Kčs.

## Gramofonová deska s "Barbuloj"

Druhé pololetí skupiny Barbuloj bylo také úspěšné. Mnohokrát vystupovali pro neesperantskou veřejnost, a to pro SSM, SNB, na parníku atd. Pro esperantisty hráli 29.11.1986 v Českých Budějovicích. Nyní vyšla gramodeska "Country grupo Barbuloj" se čtyřmi písněmi v esperantu za 16,- Kčs. Je to vhodný levný dárek k Novému roku!

## Příspěvatelům Starta

Příspěvky pro příští čísla Starta zasílejte takto: pro číslo 4 (ročník 1987) nejpozději do 10. 4. 1987, pro číslo 5 do 10. 6. 1987, pro číslo 6 do 10.8.87, pro číslo 1 (ročník 1988) do 10. 10. 1987, pro číslo 2 (1988) do 10. 12. 1987, pro číslo 3 (1988) do 10. 2. 1988.

## Čtenářům Starta

Podrobná zpráva o světovém sjezdu v Pekingu a o železničářském IFEF-kongresu vyjde v příštím čísle.

Pro příští dva ročníky připravujeme nový kurs o sebeobraně. Jeho autor Ing. J. Novák nám o něm napsal: Temas pri mia esperantigo de la ĉeĥa libro "Kapitoloj o sebeobranĉ" (Ĉapitroj pri la sindefendo), kiun verkis Ing. Ivan Špička kaj mi. Kiam ĉiu ĉi libro estis eldonita, ĝi apartenis al kvin novaj la plej bone vendataj ĉeĥaj libroj de la semajno. Ĝin mi dum 1973-1983 reverkis kaj esperantigis. Sed ĉar tiuj ĉi tekstoj konsistigas cent paĝoj kaj proks. 150 fotoj, necesis redukti ĝian amplekson. Tio estas ĉiam malagrabla afero. Por ke estu klare, kion entenas la tuta verko, mi ne sangis enhavon de unuopaĵ partoj, sed eligis iujn ne tre necesajn ĉapitrojn. En la artikolaro restas de la ellasitataj ĉapitroj nur tiuj nomoj kaj indikoj pri ilia amplekso (nombro de fotoj kaj paĝoj). Anstataŭ fotoj estas nun en la teksto desegnaĵoj.

---

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, GS-110 01 PRAGO, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: J. HANOUSEK (grafika aranĝo), J. KAŠPAREC, M. MALOVEC, JIŘÍ PATERA (responda redaktoro) kaj H. ŠTRUNCOVÁ. Presas RUCH Liberec. Transdonita al la presejo 15.12.1986. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK aŭ 10,50 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnigu al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: J. HANOUSEK (grafická úprava), J. KAŠPAREC, M. MALOVEC, JIŘÍ PATERA (odpovědný redaktor) a H. ŠTRUNCOVÁ. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18.3. 1985. Tiskne RUCH Liberec. Předáno do tisku 15.12.1986. Dohledací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovní povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

**Výtvarná řemesla**

**Praha**

Vám nabízejí široký  
sortiment bytových  
doplňků a dárkových  
a upomínkových  
předmětů,  
vyráběných převážně  
v malých sériích  
s častou inovací.



**NABÍZÍME:**

**SOUSTRUŽENÉ MOCCA SOUPRAVY  
SOUSTRUŽENÉ ODKLÁDACÍ STOLKY  
MALOVANÉ PORCELÁNOVÉ SOUPRAVY  
I JEDNOTLIVÉ KUSY  
MALOVANÉ A BROUŠENÉ VÁZY, MÍSY  
A POPELNÍKY  
VÝROBKY Z ČÍNU**

**BIŽUTERII KOVOVOU A KOŽENOU  
A DALŠÍ SORTIMENT Z KOVU, KŮŽE,  
KOŽENKY A TEXTILU**

**Adresy prodejen upomínkových a dárkových předmětů:**

110 00 Praha 1, Národní tř. 37	22 41 94
110 00 Praha 1, Vodlčková 28	24 47 71
110 00 Praha 1, Spálená 39	29 27 04
110 00 Praha 1, Na poříčí 35	23 17 315
110 00 Praha 1, Křížovnické nám. 2	26 63 28
120 00 Praha 2, Anglická 18	25 98 56
110 00 Praha 1, Lazarská 5	29 83 22
110 00 Praha 1, Železná 12	22 79 14
170 00 Praha 7, Obránců míru 17	37 44 84
110 00 Praha 1, Můstek – stanice metra	26 14 19
360 00 Karlovy Vary, Mariánská 2	930/28 381

**V našich prodejnách  
naleznete  
vhodné dárky  
pro každou příležitost.  
Naše pracovnice Vás  
ochotně obslouží  
a pomohou vybrat  
předmět,  
který potěší.**

**Vzorkovna nábytku:**

110 00 Praha 1, Václavské nám. 41	26 40 64
-----------------------------------	----------

přijímá objednávky na individuální zakázky  
nábytku a bytových doplňků.

**Český esperantský svaz  
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

**NOVINY**

**Dohlédací pošta Praha 07**  
**Snížený poštovní poplatek povolen**  
**Ředitelstvím pošt Praha**  
**J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**